ESPERANTA GRUPO
" L. L. ZAMENHOF "
S. Luca 4115 - Venezia (21) - S. Luca 4115
Ĉiuvesperaj kunvenoj de la 20.30 ĝis la 22.30

Venezia la 20an Aùgusto [illegible]4a

Estimata Sinjoro,

Kvankam Vi sendis al mi tiun propagandan poŝtkarton, mi havas la malplezuron respondi ke mi tute ne intencas aliĝi al Via API.

Ĉu Vi kredas ke la Esperantistoj estas tiel malmulte konvinkitaj pri la praktikeco kaj simpla reguleco de sia Lingvo ke nura poŝtkar=tode kontraùlo povas ilin depreni de ilia Ideo ? Mi tute ne intencas nùn instigi Vin al la studado de Esperanto: estus senutila laboro, mi scias;sed mi klarigas al Vi la kaùzojn kiuj altiris min tuj al Esperanto kaj kiuj pli kaj pli min tenas apud ĝi.

Jen ili: Esperanto estas lingvo belsona, kun malmultaj reguloj plej necesaj, sen iu escepto, kaj ĝi estas preskaù samfacile lern=ebla al homoj de kiu ajn nacio.- Plue, la prefik=soj kaj sufiksoj tre malgrandigas la nombron de l' vortoj kiujn oni devas lerni.- Krom tio ĝia ofta

. / .

uzado ĉu en la korespondado ĉu en la interparolado kun fremduloj konvinkis min praktike pri ĝia nekontraŭstarebla superecò; kaj ankaŭ la sukceso de la multenombraj Kongresoj kun multenombraj partoprenantoj pli kaj pli altiras al Esperanto ĉu antikvajn skeptikojn ĉu adeptojn de tiuj malregulaj amasoj da vortoj kiuj volus fariĝi helpaj lingvoj internaciaj.

Kontraŭe kiam mi legis ion pri "Interlingua" por vidi ĉu efektive oni estis trovintaj alian vojon ankoraŭ pli simplan por atingi universalan lingvon, mi tuj devis konstati ke ĝi posedas multajn malbonaĵojn: ĝi ne havas eĉ la plej necesajn regulojn kiuj fiksu ĝian tutmondan uzmanieron, kaj al ĝi mankas iuj formoj nepre necesaj al komuna interparolado: ĝi estas tute senregula kaj ne sekvas logikan vojon en la deveno de la vortoj havantaj saman radikan signifon: kaj fine ĝi estas nur komprenebla al novlatinaj Nacioj aŭ al tiuj alinacianoj kiuj jam lernis latinan lingvon, kaj pro tio, estante sufiĉe instruitaj, same trovus la manieron sin komprenigi en la tuta mondo. - Al tio mi povus aldoni ke anstataŭ esti nova lingvo ĝi estas neŝatinda malbonigo de nia belega lingvo Latina.

Multajn respektoplenajn salutojn